

APERAS MONATE  
**Verda Voĉo de Doksy**  
REDAKTORO ANT. SLANINA  
AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO-LERNEJO

1.II.1948

Bulteno de S.E.L. en Doksy

N-o 5


AMIKECO.

En la hodiaŭa VVD vi legos leteron de la sveda samideanino Karla Jönssone. La partoprenintoj de SEL en Doksy en la jaro 1947 certe ĉiuj persone konas la modestan, simpatian svedan samideaninon. Estas bonkoraj homoj, kiuj faras bonon sen la bruo kaj sin sentas feliĉaj, ke ili povas fari ion bonan al ceteraj homoj. Al tiuj homoj apartenas nia svedo amikino, ekstreme modesta ĉium kun agrabla rideto ĉirkau la lipoj. Somera Esperanto-lernejo volas edukadi bonajn esperantistojn ne nur laŭ vidpunkto lingva sed ankaŭ laŭ esperantista sento. Esperantistoj devas montri al la mondo, ke la amika kunvivo de diversaj nacioj estas necesa kaj ebla, ke oni en ĉiu homo devas antaŭe vidi la homon, egale kiun lingvon oni parolas. Oni ne taksu amikecon nur laŭ la nomo kaj donacoj, sed ankaŭ kaj prefere laŭ la bona volo kaj animo.

- . -

Karolo Piĉ:

Metamorfozo de kampano.



Iris diino inter kampoj,  
kie laboris juna vir',  
okuloj ŝiaj estis lampoj,  
freŝe aromis ŝia spir'.

Kaj kiam ŝi la junan viron  
ekvidis inter flava gren',  
ŝi tuj eksentis amsopiron  
kun ama log' kaj ama sven'.

Ŝi antaŭ li sin teren metis  
kaj ŝi, per sia okulpar',  
tuj lin pri arda amo petis.  
Sed certe estis li barar'!

Kaj ĉar li amis jam Alvinon,  
tie malsupre en vilaĝ',  
li forrifuzis la diinon.  
Hontante, ŝi kun la vizaĝ'

purpura pro la malhonoro,  
ekgestis. Kaj la kampanan'  
senpere en la sama horo,  
iĝis kvakanta kampa ran'.

Morala konkludo:

Tial, se iam amdiino  
vin petos pri la dolĉa am',  
agu tuj vigle sen obstino  
laŭ ŝia dezirata plan'!



Ĉar alikaze ŝi vin povus  
ŝanĝi per gesto aŭ malben'.

Kaj tre malbone vi vin movus,  
kredu, en felo de azen'!



Dr. Aug. Pitlík:

Několik kapitol o esperantu

V.

Č l e n /artikolo/ je v esperantu pouze jeden "la" a je neměnitelný pro všechny rody, čísla a pády. Užívá se, mluvíme-li o osobě nebo věci známé, určité, Dr. Zamenhof radí užití jej toliko tam, kde je nutný a kde to žádá logika. Člen není v esperantu zbytečnou přítěží, jak se někdy domnívají příslušníci národů, v jichž jazyce není členu, nýbrž nezbytným jazykovým prostředkem pro jasnost a přesnost výrazu, jemuž jeho užití neb neužití dává zcela jiný smysl: Mi renkontis soldaton / potkal jsem vojáka, nějakého vojáka, člověka, oblečeného ve vojenské uniformě./ Mi renkontis la soldaton/ potkal jsem toho vojáka, o němž jsme již mluvili, ježž dávno již známe, jenž má určitou hodnotu /.

Mi legas gazeton / čtu časopis, nějaký č. / Mi l. la gazeton / čtu ten časopis, náš předplacený č., o němž jsme mluvili, že je v něm zajímavá zpráva / . En la parko estas floroj / ve známém parku jsou květiny / . La floroj estas tre belaj / ty kv. jsou velmi krásné / .

Do češtiny se člen "la" někdy překládá ukazovacím zájmenem ten / ta, to, ti, ty, ta / . Samohlásku členu možno odsunouti / apostrofi / "l'", jak vyloženo již v kapitole IV. Děje se tak v poesii a někdy i v obyčejné mluvě.

Členové národů románských, germánských a j., v jejichž národních jazycích je člen, užívají v esperantu členu správně, stejně i Češi, kteří některým z těchto jazyků mluví. Všude tam, kde ve jmenovaných jazycích kladl by se v daném případě člen určitý / a.difina / , tam v esperantu je člen, kde však jazyky ty mají člen neurčitý, tam v esperantu není členu. Všichni ostatní, kdož si přejí správně esperantsky mluvit a užívatí na správném místě členu, měli by se řídití těmito radami:

1/ Užijeme členu "la", jestliže možno před slovo, o něž jde, aniž by byl změněn smysl věty, položití v mysli tato slova: tiu/ten, tiu certa/ten jistý, ĉiu/každý /všechen , konata /známý / , difinita / určitý / , jam preparolita / ten, o němž byla řeč / , sola / jediný / , ununura / jedinečný / , unusola / samojediný / , unika en sia speco / jediný svého druhu / a p. Příklady: Ĉiu ŝatas la personon, kiu estas honesta. Januaro estas la unua monato en la jaro. La du amikoj venis / ti dva přátelé ../Praha estas la plej granda urbo de ĈSR. Estas la sepa / rozuměj: horo – je sedm hodin / . La kvaran / tagon / de februaro. Mia fratino estas pli bela ol la via. La Savinto / Spasitel / . La Vrhlický / Vrchličtí / ne naskiĝas ĉiutage / ... se nerodí denně / . Katarina, la Semiramis de Rusujo / K., zvaná ruskou Semiramidou / .

La homo / každý čl. / estas mortema. La birdoj / všichni / flugas. La ĉielo, la firmamento, la suno, la tero. Ĝentile li levis la ĉapelon / svůj klobouk / . Ŝi estas la pli bela / ona je ta hezčí / . Následují-li za sebou slova, jež vyžadují členu, klade se buď ke všem aneb jen před prvé: La plumo, / la / plumigo, / la / krajono, / la / inko, kaj / la / inkujo estas skribilaro. Dr. Zamenhof užíval z počátku i před 3. stupněm příslovce členu "la": Margaret kantas la plej bele el ĉiuj.

2/ Neužíváme členu, lze-li před příslušné slovo – beze změny smyslu věty – položití v mysli tato slova: iu /některý / , ia nějaký / , kelka, kelkaj /některý, někteří / , peco da /kus čeho / , multa, multaj /mnohý,-zí / , pluraj /více / , laŭplaĉa /libovolný / , nekonata /neznámý / , nedifinita /neurčitý / a pod.

Ve zvolání v 5. pádě neklademe nikdy člen! Příklady: Sinjoro, atendu min! Junio estas bela monato. Hodiaŭ estas merkredo ale la paska merkredo /škaredá středa / . Mi vizitos vin dimanĉon /některou neděli / ale la venontan d. /příští n. / . Donu al mi panon /dej mi cheba / ale la panon /chléb, který je na stole / . Fero estas metalo ale La fero de Svedujo estas tre bona. Amo estas donaco de Dio ale La sincera amo estas donaco de la bona Dio. Karolo ale la saĝa Karolo. Doktoro Zamenhof ale la fama doktoro Z. Londono ale la granda Londono. Danubo ale la blanka Danubo. Leono estas besto. Mi estas soldato /jsem vojákem / .

Neurčitého členu v esp. není /nedifina s. / . Někdy se tu klade iu nebo unu: Iu ĉeĥa samideano /kterýsi / . Unu vidvino /jedna, nějaká vdova / havis.

## ENIGMO-KONKURSA PARTO

Solvo de la silab-enigmo de s-ano Dr. F. Vaněk el le 3-a numero de VVD:  
ESPERANTO DOKSY / I /

La premion gajnis s-ano Jaroslav Hošek el Doksy. Klarigo ni volas diri, ke la solvo ne estis al ni konata kaj sekve ni ne povas, kompreneble, esti suspektataj, ke ni iel kaŝkonsilis dum solvado eble pro tio, ke s-ano Hošek estas Doksano. Ni ja ĉiuj aŭ pli bone vi ĉiuj estas Doksanaj kaj krome s-ano Hošek estas jam delonge konata enigmo-solvanto.

Ni gratulas.

Solvo de la enigmo de s-ano Jarda Hošek el la 4-a numero de VVD:  
LERNADO-AMUZO-RIDO, EN DOKSY ĜIS REVIDO !

La premiojn gajnis: s-ano Ing. Josef Kochman, profesoro en Praha kaj s-anino Lidmila Rejthárková, Hradec Králové. Ni gratulas.

Novaj enigmoj:

VI. Benda

Enmetumo. / M / Vsuvka  
BARBO MIA KAJ VIA ĉe razisto restas  
ĉar SIMETRIA vizaĝo pli bela estas.

Konsonancumo. Souzvučka

Instruistino en lernejo  
REE DEZIRAS sur PLATON skribigi:  
" NUBAKVO FINA ARGILERON  
da kampoj povas nunjare moligi. "

Solvojn sendu afable al la sekvanta adreso: Vladimír B e n d a, Praha-Dejvice, Sadová 3.

- . -

Ni vere sincere ĝojan pro la ĉiam kreskanta intereso pro enigmoj. Tiun intereson de multaj niaj samideanoj ni volas ĉiuflanke subteni. La enigmoj devas esti spritaj kaj amuzaj, por ke ili trovu plaĉon ĉe la legantoj. Per ili oni bone pliriĉigas al si la vorttrezoron. Solvantaj ŝatas enigmojn krome ankaŭ pro ilia interna valoro: post ĉiu sukcese finita solvado venas stranga feliĉiga memfido-senta, kiu certagrade bone influas persistemon kaj sekve eĉ karakteron.

- . -

Ni kunvokas la konatajn enigmo-ŝatantojn samideanojn Benda, Tůma, Dr. Vaněk, Hromas, Černý, Mašek kaj ceterajn! Grupiĝu en rondeto ĉirkaŭ Verda voĉo de Doksy. Informu vin ĉe: Jarka Hošek, Doksy, ŝparejo.

- . -

## NOVAĴOJ

"V e r d a s t a c i o " Praha estis la 5-an de januaro solene inaŭgurita. El eksterlando venis multaj salutleteroj. Elsendoj de "Verda stacio" okazos ĉiun unuan lundon en monato, je la 23-a h. vespere. Ne forgesu aŭskulti Praha II, Brno I, Ostrava, České Budějovice. Ĉeĥoslovakaj samideanoj skribantaj al "Verda stacio" skribu en la nacia lingvo. La programon por la 2-a de febr. Verkis instruisto de SELD Antonín Slanina.

Aktoj de "Verda stacio" Karel Högr, Vladimír Leraus, Antnín Klimeš, Lída Klimešová versimile partoprenos Someran Esperanto-lernejon en Doksy dum 1948. Detalojn ni ankoraŭ sciigos.

Esperanto-klubo en Praha fondis "J u n u l a r a n s e k c i o n". Ĝi estos reorganizita al sekcio teatro-amatora kaj kunlaboros kun "Verda stacio". La junularo preparas artvesperon en Esperanto.

En P o d m o k l y – D ě č í n estis la 2.I.1948 fondita E-klubo "Ĉiam antaŭen. Prezidanto V. Chmel, sekretario V. Růžička. Kiel gastoj partoprenis delegito de Esperanto-Asocio en ĈSR s-ano Slanina, delegito de esperantistoj en Ústí n.L. samideano Mothejzík.

En Ostrava-Kunčičky s-ano Hanzelka aranĝis E-ekspozicion kaj gvidis E-kurson.

En Staré Splavy s-ano Severa finis kurson. Novaj gesamideanoj de tiu loko decidiĝis aniĝi al Esperanto-klubo en Doksy. En la hotelo Schnabel estis aranĝita bela amuzvespero kun muziko kaj danco. Partoprenis 12 samideanoj el Doksy. Reprezentanto por la movado en Staré Splavy estas s-ano Václav Radil, lernejestro, al kiu vi povas vin turni serĉante helpon aŭ informon.

Nova kurso por komencantoj estis malfermita en Doksy. La kurson gvidas s-ano Špŭr helpe de s-anoj Hošek kaj Hašlar. El 49 aliĝintoj partoprenis la unuan lecionon 37 personoj, 6 antaŭanoncis sian nealvenon. La unua leciono estos ripetata. Oni instruas merkrede.

E-klubo en Doksy preparas por la monatoj marto kaj aprilo unuagradan kurson en Bělá p.Bezd. Instruos Špŭr, Hošek. Teatro-amatora societo en Bělá p.Bezd. speciale interesiĝas pri la kurso en tiu loko, ĉar ties aktoj, kiuj pasintjare aktive kunlaboris dum la teatra festivalo en Doksy, havis okazon kontroli la esperantligvan prezentiĝon de Nokto en Karlův Týn. Ilia fina celo estas atingi eksterlandon por tie prezenti esperantajn ludojn.

## VOĈOJ PRI SELD

La sveda samideanino Karla Jönsson el Ystad skribas: Ofte mi rememoras la bonajn instruajn lecionojn dum agrablaj horoj en Doksy en atmosfero vere esperantista. Jes, la tuta trisemajna restado inter esperantistoj en ĈSR donis al mi belajn, feliĉajn rememorojn kaj kredon, ke Esperanto baldaŭ venkos. Kiam la somero venos, certe estos sento al la bonega Somera Esperantlernejo en Doksy. Kredeble la jaron 1949 ni venos la tuta karavano. Al la partoprenintoj en SELD 1947 kaj al ĉiuj gesamideanoj mi kun bondeziro salutas.

Via Karla Jönsson.

## VORTLUDOJ

"Ho, bela ĉarmulino" diris komplimente sinjoro al Ŝi ĉe balo. Sed ŝi forrapidis ofendite. Ĉu vi scias, kial? Jes. Ŝi ja malfeliĉe komprenis . . . ĉar-mul-ino ! / ĉaro-koĉár, mulo-mula /

## PROVERBOJ

Rapidu malrapide! Kiu iras trankvile, iras facile. Du militas, la tria profitas.

## PROPAGANDO

Nuntempe estas en pluraj lokoj de la respubliko starigataj lokaj grupoj kun celo organizi en loko vojaĝtrafikon / speciale fremdul-trafikon /. La tutŝtata organizaĵo kun sia centro en Praha / Ústřední svaz pro cizinecký ruch – Centro asocio por fremdultrafiko / estos baldaŭ leĝe envivigita. S-ano Špŭr havis hazarde bonegan okazon por propagande paroli dum la unua kunveno de Centra asocio por fremdultrafiko,

okazinta en Praha sabate la 31-an de januaro 1948. Ĉeestis pli ol 200 reprezentantoj de lokaj naciaj komitatoj kaj lokaj fremdultrafikaj grupoj. Estos necese, ke nialandaj E-kluboĵoj kaptu tiun ĉi okazon kaj klopodu fariĝi anoj de la lokaj organizaĵoj, kio cetere estos nur dezirinda flanke de la koncernataj grupoj.

Praktika uzo de nia lingvo estas la plej efika propagando. En Lyon stariĝis Asocio "Esperanto kaj komerco", du unufoje kunvenos dum la foiro de Lyon la 10., 11. kaj 12. de aprilo 1948. Informu vin ĉe s-ano František Pytloun en Hradec Král., Zamenhofova 1010 aŭ rekte ĉe s-ano Richard Levin, fakestro pri Propagando, Foire de Lyon, Rue Ménestrier, Lyon.

JSTE VŠICHNI ČLENY SVAZU  
ESPERANTISTU V ČSR ? ODEBÍRÁTE  
VŠICHNI ČASOPIS " ESPERANTISTA " ?  
DEJTE SE INFORMOVAT ! PIŠTE PROTO  
VŠICHNI, KTERÍ JSTE DLUŽNI NAŠEMU  
HNUTÍ SPLNĚNÍ TÉTO SAMOZŘEJMÉ A  
PRO KAŽDÉHO OPRAVDOVÉHO  
ESPERANTISTU MILÉ POVINNOSTI,  
SVAZU ESPERANTISTU V ČSR, PRAHA  
XIX, URALSKÉ NÁM. 9 !!

#### REDAKCIA KESTO

Prosíme, neopomeňte vždy ohlásit změnu své adresy Letní škole esperanta v Doksech.

Informujte nás o svých věcech, majících vztah k Letní škole esperanta nebo k některému z jejích účastníků!

Komitét "Školy" sejde se ke své další pracovní schůzce pravděpodobně v neděli 15. t.m. při příležitosti "valné hromady" Klubu esperantistů v Praze v kavárně Louvre, Národní tř.

K padesátinám, které v těchto dnech slavil p.vrchní odb.rada min.dopravy s-ano Dr. Karel Křišťufek přeje Letní škola esperanta jmenovanému stále zdraví a opětné brzké shledání se všemi známými v Doksech.

#### KONTRAŬ DOLORO HELPAS BONA HUMORO

La instruita knabo.

Instruisto / dmandante knabon /: - Kiom da tempo Adam kaj Eva estis en paradizo ? Knabo:

-Ĝis aŭtuno ! Instruisto: -Kial vi opinias tion ?

Knabo: . Ĉar nur en aŭtuno la pomoj maturiĝas.

Instruistino: -Kiujn dentojn ricevas la homo laste? Lernanto: -La falsajn !

A: Kiamaniere estiĝas senaera spaco?

B: Kiam biciklisto surveturas najlon.

Horloĝa purigado. Patro: -Mi ne povas kompreni, kial mia horloĝo ĉiam haltas. Mi kredas, ke mi devas ĝin sendi al horloĝisto. Eble ĝi bezonas purigon. Filineto: -Ho ne, paĉjo! Mi ĝin matene lavis jam sufiĉe.

Pro bastono. Malgranda Joĉjo plendas plorant: -Ho ve, rompiĝis bastono de mia patro.

Pasanto: -Pro bastono vi ploras! Joĉjo: -Jen, sed ĝi rompiĝis sur mia dorso.

Almozulo: -Mi petas almozon por mizera blindulo ! Sinjoro: - Kaj kie estas la blindulo?

Almozulo: -Tie ekstere li gardestaras, ĉu ne venas policisto.

Ĝi estis perdita. Majstrino / al la lernknabo /: -Sentaŭgulo, kiel vi povis perdi la kolbason el la korbo?

Lernknabo: Ha, majstrino, survoje mi levis iomete la kovrilon kaj vidante la kolbason, tiam – ĝi estis perdita.

A: Vi ja ĉiam volas esti pli saĝa ol mi. B: Tio tamen estas tre modesta deziro, ĉu ne?